

V-23562/10

Esperanto

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 6

JUNIO, 1946

INTERNACIA KULTURO

monata grandformata (33×24 cm.) 16-paĝa gazeto, organo de Bulgara Esperantista Asocio.

Redaktata ekskluzive en Esperanto. Luksa eldonaĵo, riĉe ilustrita. Celo de la revuo estas diskonigi la kulturan, societan kaj ekonomian vivon de la balkanaj landoj kaj organizi amasan internacian korespondadan movadon.

La enhavo estas diversa kaj tre interesa : rakontoj, versaĵoj, belartaj pentraĵoj, artikoloj, sciigoj pri la Esperanto-movado, k.t.p.

Abonprezo : 7/6 jare por 10 numeroj.

Abonu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiuj du vortoj.

Leterkunveno. Bonvolu sendi poŝtkartojn kaj leterojn al Esperanta Grupo, Arras, Francujo, okaze de Norda Federacia Kongreso, la 16an de Junio.

D-ro Jozefo Mohacsy, 32-jara verkisto, deziras korespondi kun ĝejnuloj inteligentaj. Varazs utca 4, Budapeŝt XII, Hungarujo.

Ĉu vi deziras aĉeti, vendi, aŭ ŝanĝi : poŝtmarkojn, librojn, revuojn, ilustritajn ĵurnalojn en Esperanto kaj naciaj lingvoj, pri filatelo, literaturo, kutimoj kaj moroj, kaj materialon pri la Esperanta movado ? Ĉu vi deziras kunlabori pri Esperanta kaj filatela eldonaĵoj ? Skribu tuj al Fermo INDEXX, Casella Postale 145, Vicenza, Italujo.

Esperantistoj ĉiulandaj unuiĝu por sukcesigi la letervesperon de Grupo Esperantista de Thyregod, kiu okazos la 25an de Junio. Ni nepre respondos al ĉiu skribinto. Adreso : "Skovlund" pr. Thyregod, Danujo.

Sendu salutleterojn al kursfina festo, unusemajna teatra festo kun Esperanta ekspozicio, en Doksy ĉe lago de Mácha en Bohemio, Ĉeĥoslovakujo. Adreso : Divadelní festival, sinjoro J. Rydl, faka instruisto, Doksy ĉe lago de Mácha. Salutleteroj kaj kartoj respondotaj.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustritajn (sen kovertoj) kun ĉiuj landoj : F-ino M. Maier, "Orchard Close", Chearsley, Nr. Aylesbury, Bucks., Anglujo.

Kvar junaj svadoj, komencantoj, deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉio ajn : Rubert Lundén, Askan 6, Avesta ; Harry Berglund, Uven 5, Avesta ; Yngve Fagerström, Hamngatan 9, Avesta ; Nils Gröning, Box 5154, Krylbo. d

Aŭstrujo. Salzburgaj gesamideanoj deziras korespondi kun anglaj Esperantistoj. Skribu pere de Franz Fötinger, Kaserngasse 5, Salzburg.

Pri Mondregado kaj internaciaj aferoj, Del. A. C. Boyle, 340 Sailor Bay Road, Northbridge, N.S.W., Aŭstralio, deziras korespondantojn en ĉiu lando.

Ĉe-instruisto, norvego, proponas siajn servojn por doni kursojn. Facilaj kondiĉoj. Skribu al O. T. Nicolaisen, c/o Jansson, Helsingegatan 7, Stockholm, Svedujo.

Esperantistoj ĉie ! La geanoj de la Southbourne Studgrupo okazigos letervesperon en Julio. Ni kore invitas leterojn kaj kartojn de kursanoj. Nepre respondos. Sekretariino : F-ino Keeble, 62 Seaward Avenue, Bournemouth, Anglujo.

Pra-historio ; diskutado kaj interŝanĝado de ŝtonepokaj restaĵoj dezirataj. S-ro H. K. Hindmarsh, Kinangop, Kenya, Orienta Afriko.

Korespondrondo tuthoma—formigas por studi, kundiskuti kooperajn komunumojn ; por interŝanĝi tutplanedajn informojn, novaĵojn, ideojn pri ili kaj pri aliaj kooperaj aferoj. Adresu : Korespondrondo Koopera, per *Esperanto Internacia*.

Deziras aĉeti bonan ekzempleron de la libro "Naŭlingva Etimologia Leksikono" de Bastien. Pagon per internacia poŝtmandato aŭ per sendo de nutraĵoj. Vin turnu al S-ro R. C. Marble, 301 Bloomfield Rd. BURLINGAME, California, Usono.

23-jara sinjorino volas korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Certe respondos. S-ino R. Braet-Amerlinck, Escheboomstr. 1, Brugge, Belgujo.

Nederlanda fraŭlino kun dektrijara sperto en hejma-mastrumado kaj diplomita vestkudristino deziranta lerni ŝpinadon kaj teksadon en ia sveda familio estas preta fari tiean mastrumadon por malgranda rekompenco. Ĉiujn skribaĵojn bonvolu adresi al F-ino A. Bosscher, Volkerakstraat 49-II, Amsterdam-Z, Nederlando.

Elkorajn dankojn al tiuj cent personoj el 17 landoj kiuj sukcesigis la letervesperon aranĝitan de la Cardiff Esperantista Grupo. Ni certe respondos al ĉiu sendinto. Edith Downes, 4 Robert Street, Barry, Glam., Britujo.

Adressanĝo. Ges-roj Arthur C. Oliver nun loĝas ĉe 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, monerojn, ex libris, kun la tuta mondo. Ĉefbarbiero Eric Ericsson, Ekängen 67, Ektorp, Sved

Seriozan komercan rilaton—serĉantoj kun Hungarujo, precipe tiuj kiuj povas tie investi kapitalon, turnu vin al P. Balkányi, Budapest 507, Kreditbanko.

Virino verkanta libron pri virinaj aferoj deziras korespondi kun tutmondaj virinoj ; legistinoj, instruistinoj, artistinoj, butikistinoj, k.t.p. Pauline Bragg, 12 Curzon Road, Weybridge, Anglujo.

Pensologio. Serio de 12 klarigaj libretoj. Ne celas fondi novan kulton, sed helpi homojn de ĉiu religia krednuanco. La dekdupon kontraŭ 4 respondkuponoj. Hipsley, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Angloloando.

Vidu ankaŭ kovrilon 3.



LA ESTRARA KUNSIDO

Preskaŭ ŝajnis, ke la ses longaj jaroj militaj neniam okazis, kiam la Estraro de IEL kunvenis je Pasko en la Centra Oficejo. Ĉiu iomete maljuniĝis, kompreneble, sed ne estis grava diferenco kaj ĉiu estis tre kontenta rekomenci la laboron post la longa interrompo. Mankis D-ro Kempeneers pro speciala deĵoro, kaj D-ro Lapenna pro vojaĝaj kaj aliaj malfacilaĵoj; sed Generalo Bastien, S-roj Malmgren kaj Oliver estis tiel viglaj kiel kutime, kaj ŝajnis pretaj por la amaso da laboro. Efektive multe de laboro atendis ilin, ĉar en tiuj jaroj gravaj problemoj leviĝis; sed ĉio ricevis zorgan konsideron kaj en tiuj kvar plenaj tagoj ili pli-malpli kontentige solviĝis. Kelkaj ankoraŭ devas esti konsiderataj de nia plena Komitato, kaj kelkaj atendas respondojn el aliaj instancoj; sed pri iuj aferoj ni povas jam nun doni informon al niaj membroj.

Administrado—La Estraro ekzamenis la laboron faritan dum la militaj jaroj kaj dum la lastaj monatoj, kaj esprimis sian kontenton pri la rezultoj. Precipe kontentiga estas la nunjara progreso, kiel oni povas vidi per la statistiko sur paĝo 96. Aparte interesa estas la fakto, ke ni nun havas pli ol 1700 Delegetojn, kaj tre verŝajne baldaŭ havos pli ol dumil.

Elektioj—La elekto de la Komitatanoj okazos en 1947: de la Ĉefdelegetoj en 1948: kaj de la Delegetoj en 1949. Informoj pri la aranĝoj estos ĝustatempe sendataj.

Universala Kongreso—Jen la afero pri kiu la Esperantistaro senpacience atendis informon dum multe da monatoj. La venonta Kongreso okazos en 1947 en Svislando—tre verŝajne en Bern. Tion ni sukcesis indiki per piednoto en la antaŭa numero de la gazeto. Ni esperas baldaŭ povi doni pluan informon. La Kongreso en 1948 okazos en Malmö, Svedujo.

Jarlibro—Oni decidis, ke principe la unua parto enhavu la oficialajn informojn pri IEL, informon pri la Landaj kaj Fakaj Asocioj, kaj la Delegetaron; la dua parto enhavu la Landajn Raportojn, Raporton pri la Kongreso, Sanĝojn ĉe kaj aldonojn al la Delegetaro, kaj—se eble—fakterminaron. Tiu aranĝo validas de la venonta jaro.

Fakaj Asocioj—La Estraro akcentis la grandan valoron, kiun povas alporti al la Movado viglaj kaj bone organizitaj fakasocioj. Ĝi tre esperas, ke post nelonge, ĉiuj gravaj fakaj organizaĵoj restariĝos. IEL estas preta doni ĉiun eblan helpon, kaj samtempe esprimas la esperon, ke ili reciproke kunlaboros kun la ĝenerala movado.

Gazetoj—Post konstato, ke de tempo al tempo aperas novaj gazetoj, kiuj ne estas sur bona ekonomia bazo kaj tial ne povas elteni la konkurencon sed malaperas, la Estraro deziras atentigi la Esperantistojn, ke eldono de Esperantaj gazetoj estas tre riska entrepreno, ĉar la Esperantistoj en la mondo estas relative malmultaj kaj la jam aperintaj gazetoj relative multaj. Nur se iu kapablas noveltoni vere unuaklasan gazeton, kaj havas ekonomiajn rimedojn por toleri sufiĉe grandajn perdojn unu aŭ du jarojn, nur tiam li povas havi esperojn pri sukceso. Se la nomitaj kondiĉoj forestas, estas pli rekomendinde kunlabore subteni kaj plibonigi la jam ekzistantajn gazetojn.

* * *

Jen iom seka raporto pri tiuj punktoj nun publikigeblaj, sed kompreneble, la Estraro ankaŭ diskutis pri tre multaj rutinaj aferoj—la legado nur tedus vin—sed la decidoj estis gravaj por la bona funkciado de nia laboro. Plej grava estis la optimismo, kiu regis post konsiderado de ĉiuj nuntempaj faktoroj. La situacio estas multe pli hela ol ni rajtis esperi tiel baldaŭ post la sesjara haoso. Ŝajnas, ke ni nun rajtas atendi pli rapidan progreson ol iam ajn antaŭe en la historio de nia movado. Se niaj kvar plenaj labortagoj dum la Paska *libertempo* helpas al tiu sukceso, ni mem certe estos tre kontentaj.

C.C.G.

NI KONSERVU LA SIMPLECON DE ESPERANTO

Vortoj povas esti tre simplaj, kiel ankaŭ tre komplikaj. Ili similas al matematika problemo. $2+2=4$. Eĉ okjara infano tion scias. Sed se oni diras $946+5876=?$, nur lerta matematikisto povas tuj respondi. La plimulto de homoj bezonas paperon kaj krajonon por solvi la problemon. Estas same pri vortoj. Ĉiu esperantisto komprenas la vortojn *ĉevalo, rozo, domo, kato, lumo, ĉielo, ami, legi*. Sed se oni uzas, ekzemple, la strangan, malbelan kombinaĵon *almildialbiĝis*, kiun vorton certa aŭtoro uzis, oni devas dismembrigi ĝin por kompreni ĝian signifon. Kaj kia estas ĝia signifo? Per tiu vorto la aŭtoro volas diri, ke certa afero tiel malplaĉis al li, ke li volus sendi ĝin *al mil diabloj*.

En presita verko la danĝero uzi tiajn monstraĵojn ne estas grava, eĉ se ĝi pekas kontraŭ bonstileco, ĉar oni povas halti, studi la vorton, grati al si la kapon, kaj fine solvi ĝian signifon. Sed en parola lingvo tiaj longaj kunmetitaj vortoj tute

ne taŭgas. Estas kvazaŭ oni ĉasas leporon, kaj en la momento, kiam oni estas preta kapti ĝin, oni vidas floron sur la kampo, haltas por eltiri ĝin por la butontruo, sed dum oni tion faras la leporo jam sin trovas en la malproksima distanco. Kiam oni ekaŭdas komplikan vorton oni devas halti kaj cerbumi, sed dum oni tion faras la parolanto jam estas eldirinta tutan frazon, aŭ eble kelkajn frazojn, kaj la leporo—tio estas, la signifo de la vorto—jam ne estas kaptebla.

Multaj homoj, por montri sian instru-tecon uzas longajn maloftajn vortojn, sed la vere instruita homo uzas simplajn vortojn kaj simplajn frazojn. "Simpleco estas arto" estas diraĵo, kiun oni povus kun profito apliki al lingvo. La Biblio estas verkita en tre simpla stilo, kaj ĝi estas literatura majstraĵo. En la fruaj tagoj de Esperanto, simplan, belan stilon uzis Boirac, Corret, Kabe, Mybs, Grabowski, Cart, Ellis, Nylén, Wackrill, kaj aliaj. La Zamenhofa stilo estis mirinde simpla. Kiam oni legas la verkojn de Zamenhof oni ne bezonas krajonon kaj paperon por dismembrigi liajn vortojn; ne, oni tuj komprenas, ĉar liaj vortoj estas simplaj kaj la stilo klara kiel kristalo.

Mi iam renkontis sinjoron kiu portis la verdan stelon en sia butontruo. "Ha, sinjoro!" mi diris, "Ĉu vi estas Esperantisto?" "Ne," estis la respondo. "Mi estas esperantismisto." Li vidis nekomprenon en mia vizaĝo kaj aldonis, "Mi akceptas la internan spiriton de Esperanto, esperantismon, kaj tial mi ja estas esperantismisto." Nu, mi ankaŭ akceptas la internan ideon de Esperanto, sed mi rifuzas malbeligi kaj kripligi la lingvon per monstraĵaj vortoj. La simpleco de la Zamenhofa lingvo estas ĝia plej bela eco. Ni konservu tiun simplecon. Simpleco estas arto.

Dr. Lehman Wendell,
Minneapolis, Usono

PRINTEMPA VENTEGO

Nigraj nuboj dense noktas sur ĉielo,
En la arbokronoj furiozas vent',
Kaj en mia brusto, tra animmalhelo,
Vibras plorsingulto de pasilament'.

En venteg' turniĝas floroj kaj folioj:
Morti devas ili jam en juna fru'.
Tiel disflugetas miaj songvizioj,
Flugas al senlimo, flugas al detru'.

La ventego bruas, kaj en mia koro—
Kaj en mia koro muĝas la sopir',
Skuas min sovaĝe mia amangoro
Kaj senhalte kreskas mia amdelir'...

Lucien Laurat, Francujo

LA PETSKRIBO

Lavange nun alvenas la folioj! Per la aldonita tabelo, kontrolita ĝis fino de Aprilo, oni povas konstati, ke nia brava anaro bone laboras. Unu el la plej ĝojgaj faktoj elstarantaj, estas tio, ke preskaŭ ĉiuj instancoj de la Esperanto-movado kunlaboras, kaj la rezultoj bele montras la veron de la devizo *Unueco Estas Forto*. Neniam antaŭe en la historio de nia movado, sin manifestis tiom da interkonsento pri unusola afero, kaj ni volonte akceptas tion, kiel bonaĝuron por la estonteco.

Ne nur en la movado Esperantista la intereso estas vekita, sed ankaŭ en rondoj ter ni. Niaj danaj kunlaborantoj raportas pri partopreno de organizaĵoj ne-Esperantistaj, kies idealoj estas en harmonio kun la niaj. En Urugvajo oni devis varbi la helpon de ne-Esperantistoj por entrepreni la grandan taskon disdoni kaj kolekti la deklarfoliojn. Antaŭ ili staris grava problemo. Kiel evitigi al tiuj bonvolaj helpantoj esti embarasataj per demandoj, kiujn ili eble ne povas respondi? Jen kiel ili solvis la problemon: ĉiun folion oni enmetis en 4-paĝan kovrilon, kiun oni utiligis ĉi tiel. Sur la unua paĝo sin trovas klarigo pri la Petskribo; la teksto sur la du internaj paĝoj portas titolon *Kio Estas Esperanto?* kaj la lasta paĝo reklamas pri la Urugvajia Esperanto-Asocio kaj pri librejo, kie oni povas havigi Esperantajn librojn.

Ankaŭ en Islando oni bone reklamas, aranginte, ke la deklaro estu presita sur deŝirebla folio, kiu lasas en la manoj de la subskribinto propagandfolion kun informo kaj adresoj. En Britujo oni dissendas kun la deklaroj cirkuleron pri la valoro de Esperanto en edukado.

Gratulinda estas la agado de multaj samideanoj, kiuj organizas inter si konferencojn pri tio, kiu povos ricevi plej multajn subskribojn. En Usono unu samideano jam fiksas sian privatan kvoton je unu mil! Nu, kiu venkos tiun?

Danke al niaj rimarkigoj en la antaŭa numero, niaj kolego-kolektantoj multe helpas al ni kaj grupigas la ensendotajn foliojn laŭ la okupoj klasifikitaj en nia listo. Tio helpas kaj ilin kaj nin, ĉar per tio estas necese Esperante indiki la okupojn nur en la respektivaj grupoj, sed ne sur ĉiu aparta folio. Por klarigi, kiel tio helpas nin, ni menciuj, ke post ricevo kaj grupigo laŭ okupoj, ni DONAS NUMERON AL ĈIU FOLIO, por ebligi la registradon.

Notu, ke en nia klasifiko, ni nuligis la fakon *Termezuristoj* kaj tiujn klasifikas kun *Diversaj*.

Jen la ciferoj ĝisdataj:

Landoj

Aŭstralio ..	147	Italujo ..	2
Aŭstrujo ..	44	Kanado ..	22
Belgujo ..	573	Kenjo ..	5
Britujo ..	2428	Maroko ..	541
Bulgarujo ..	2516	Nederlando ..	1
Brazilo ..	200	Norvegujo ..	5779
Ĉeĥoslovakujo ..	1	Palestino ..	6
Danujo ..	1905	Polujo ..	2
Egiptujo ..	622	Portoriko ..	1
Finnujo ..	1823	Portugalujo ..	2512
Franĉujo ..	1340	Rodezjo ..	2
Germanujo ..	22	Sieraleono ..	6
Grekujo ..	248	Svedujo ..	1
Hindujo ..	10	Usono ..	110
Hungarujo ..	523		
Islando ..	2496		23888

Okupoj

Artistoj ..	200	Navigaciistoj ..	195
Delegitoj ..		Parlamentanoj ..	9
Komunumaj ..	20	Policistoj ..	160
Dentistoj ..	27	Presistoj ..	299
Desegnistoj ..	136	P.T.T.-istoj ..	752
Dommastrinoj ..	3111	Religiistoj ..	76
Edukaj ..		Sciencistoj ..	92
Aŭtoritatuloj ..	15	Sindikataĉefoj ..	18
Elektristoj ..	193	Soldatoj ..	299
Farmaciistoj ..	75	Studentoj ..	1862
Farmistoj ..	1258	Ŝoforoj ..	293
Hotelistoj ..	105	Ŝtatoficistoj ..	527
Inĝenieroj ..	1023	Teknistoj ..	24
Instruistoj ..	1284	Transportistoj ..	1269
Juristoj ..	112	Urboficistoj ..	163
Ĵurnalistoj ..	91	Vendistoj ..	412
Komercistoj ..	4621	Vestistoj ..	361
Konstruistoj ..	358	Diversaj ..	1569
Kuracistoj ..	427		
Laboristoj ..	1517	sume ..	23888
Lingvistoj ..	31		
Metiistoj ..		Ĝis 23 Majo: ..	35022
Diversaj ..	904		

EL PALESTINO

Ĉe-metoda kurso estas starigita en Tel-Aviv kaj partoprenas 30 personoj. La kurson gvidas VicĈefdelegito de IEL, S-ro O. Berman.

Ĉe la Junulgastejanoj

La Esperantista junulgastejo *Stefa Domo* en Saint Jean de la Neuville par Bolbec (Seine Inf) Franĉujo organizos dum 1946 Esperantistan Semajnon por la junu gastejanoj. De nun interrilatu kun S-ro Andreo Louvel, La Jolie, Bolbec.

RAPORTOJ PRI LA MOVADO

ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo daŭre viglas, kvankam la membro-nombro ne rimarkinde kreskis. Post persista agado, la antaŭe nefavoraj nacilingvaj gazetoj nun publikigas sufiĉe regule novaĵojn kaj propagandajn artikolojn liveritajn de la propaganda servo de AEL. Daŭras ankaŭ la propagando per la radio.

Per korespondo Esperanto estas instruita al pli ol 2000 gelnantoj en tuta Hispan-Ameriko. Funkcias ankaŭ multaj kursoj.

Dum Pasko 1946 okazis tria Jarkunveno de Delegitoj en Kordobo, kaj al la 10a Brazilia Esperanto-Kongreso AEL sendis delegitojn.

Eldoniĝis nova lernolibro *Curso Elemental de Esperanto* de D-ro J. kaj D-ino R. Scolnik, kaj aperis la unua originala Esperantoverko eldonita en Argentino—novelo *La Trovita Feliko* de R. Sekelj.

Argentina Esperanto Ligo faris decidon en sia pasinta Kongreso aliĝi al IEL.

AEL

ĈEĤOSLOVAKUJO

La Komisiito de la Slovaka Nacia Konsilantaro por instruado kaj klerigo en Bratislava dekretis, ke Esperanto estu enkondukita en komercajn lernejojn kaj akademiojn kiel laŭvola fakoj.

La instruado jam komenciĝis en Trencin per 4 studrondoj el po 20–25 studentoj kaj en Komerca akademio de Bratislava kie oni instruas 30 studentojn. Ankaŭ en Slovaka Komerca Altlernejo de Bratislava komenciĝis oficiala instruado de Esperanto.

GERMANUJO

(Unu leganto, kiu forlasis Germanujon pro la Nazi-reĝimo, kaj kiu estas bone informita pri la cirkonstancoj en tiu lando kaj en la Germana Esperanto-movado dum la unuaj jaroj post la ekrego de Hitler, petas nin publikigi la jenon.)

Kun granda ĝojo mi legis en la aprila numero de *E.I.* pri la reviviĝo de nia movado en la regiono de Germanujo okupata de la Usonanoj. Bedaŭrinde la raporto enhavas aserton nekonforman al la faktoj, kiu bezonas ĝustigon. Evidente la raportinto estas samideano relative nova, kiu nek persone spertis tiujn plej dramecajn momentojn de la germana Esperanto-movado nek posedas la librojn, gazetojn aŭ aliajn dokumentojn por ĉerpi el ili la ĝustajn informojn. Alie li ne povus aserti, ke ekzemple Germana Esperanto-Asocio estis fondita de la "faŝistaj" Esperantistoj. Envere ĝi fondiĝis jam antaŭ 40 jaroj

(precize la 19an de Majo 1906) kiam kredeble eĉ la esprimoj *faŝismo* kaj *nacisocialismo* ankoraŭ ne ekzistis. Estas vere, ke GEA, sub la nazi-reĝimo ekstere konformiĝis al la nova situacio; ĝi ankaŭ elektis kiel prezidanton, membron de la Nazi-partio, sed tiu ĉi partiano estis plimulte Esperantisto ol naciisto kaj li ne perfidis la idealojn de Zamenhof. La granda plimulto de la membroj de GEA (minimume 90%) ĉiam restis interne malamikaj al la Hitler-reĝimo kaj ĝia ideologio. Ĝuste tial GEA estis tiel fervore kontraŭbatalita de la naziamaj Esperantistoj kunigintaj en la tiel nomita Nacisocialista Germana Esperanto-Movado (NDEB), kiu poste postulo de la aŭtoritatoj, devis forstrekii el sia nomo la vorton "Nacisocialista" kaj ŝanĝis ĝin al "Nova". Cetero pri la membroj de tiu NDEB ankoraŭ ekzistas preskaŭ kompleta listo.

* * *

La 24an de Marto okazis en konstruaĵo de la Universitato München bone reklamita propagandkunveno de la tieaj gesamideanoj. Ĉeestis proksimume 400 personoj. La programo estis lerte aranĝita kaj vere interesa. Iu profesoro klare montris la efikecon de Esperanto kiel internacia helplingvo, kaj konata aktoro de la Bavara Ŝtata Teatro deklamis diversajn literatur-ajojn en germana kaj Esperanta lingvoj. F-ino Mary Lippert (Anglujo) deklamis novan poemon de Teo Jung, kaj Leŭtenanto C. Simon (Usono) faris paroladon kaj transdonis la salutojn de IEL, EANA, BEA kaj UFE al la kunvenintoj. Poste D-ro Ziegler, prezidanto de la grupo "Laboro", tradukis la parolon en germanan lingvon. Ĉeestis multaj alinacianoj, verŝajne el koncentrejoj, inter kiuj estis Poloj, Hungaroj, Ukrainanoj kaj Litovoj. La tuto estis tre impresa afero.

C.E.S.

HUNGARUJO

Sekve de tre grava laboro farita de parlamenta konsilanto Prof. L. Kőkény, montriĝas en la Hungara parlamento multa intereso pri nia afero. La 21an de Februaro okazis en festa ĉambro de la parlamentejo mem grava kunveno, kiun partoprenis konataj hungaraj eminentuloj. Ili decidis iniciati la fondon de Grupo de Esperanto-amikaj Deputitoj. Kvankam tiu grupo ankoraŭ ne oficiale estas starigita, ĝi efektive funkcias. Okazis ankaŭ kunsido 15an de Aprilo sub prezido de Prof. Kőkény, kaj partoprenis interalie ŝtatssekretario kaj unu parlamentano. S-ro Kőkény gvidas kurson en la parlamentejo

kaj havas 8 studentojn. Jam 10 oficistoj tie deĵorantaj parolas nian lingvon.

Alia rezulto de la ĉi-supra kunsido estas tio, ke partopreninta Prof. M. Marczell, kiu estas direktoro de altlernejo por instruistinoj en Budapeŝt, deklaris ke li tuj enkondukos Esperanton en tiun altlernejon. Tion li faris kaj nun Prof. F. Erdey gvidas kurson el 80 estontaj instruistinoj, kiuj entuziasme lernas nian lingvon. La kurso daŭros tri semestrojn kaj poste oni donos diplomon.

En la nuna tempo Esperanto ĝuas la subtenon de multaj oficialaj instancoj kaj la estonteco estas tre esperdona. En Universitato Pécs nun estas Esperanta Katedro kaj la hungara radio promesis konduki Esperanton tuj kiam funkcios stacioj; oni petas, ke samideanoj skribu multe.

Hungarlanda Esp.-Societo laboras en harmonio kun Hungara Esperantista Societo Laborista, kies Prezidanto estas S-ano Stefano Kossa, ĉefsekretario de la Sindikatoj en Hungarujo kaj VicPrezidanto de la parlamento.

P. Balkányi kaj L. Kőhény

IRLANDO

Je la 20a kaj 21a de Aprilo okazis en Dublino la Unua Irlanda Kongreso de Esperanto. Nemultaj partoprenis, sed montriĝis granda entuziasmo. Regularo estis starigita kaj oni elektis provizoran komitaton, kies prezidanto estas S-ro L. O'hUiginn, kaj sekretario S-ro O'Cuirc en Ballina.

La nove fondita asocio estos neŭtrala rilate religion kaj politikon, kaj uzos irlandan, anglan kaj Esperantan lingvojn.

Fandistoj Atentu !

D-ro Dronchat, advokato ĉe Apelacia kortumo, Delegito de IEL, 44 Rue des Ecoles, Paris (5) Francujo, petas al ĉiu samideano, kiu laboras en fandejo konigi al li sian nomon kaj adreson kun la celo verki fakterminaron pri fandmetioj. Jam ekzistas franca terminaro, kiu povos helpi en la kompilo de tiu Esperanta verko.

Delegito de IEL en Pretoria, Sud-Afriko —J. Semmelink— iniciatis en sia teritorio planon por la starigo de Universitato por la indiĝenoj. La asocio, kiu prizorgas la aferon, havas la titolon, *Kolege Ya Bana Ba Afrika* (t.e. en bantua lingvo—*Kolegio de la infanoj de Afriko*). Tiu homaranisma laboro meritas ĉian subtenon.

SOLENA MESO EN ESPERANTO.

Okazis en Buenos Aires la 22an de Septembro 1945 solenaĵo nome Esperantista Sankta Meso.

En tiu tago Lia Eminentia Moŝto Kardinalo Copello konsekris en la metropola katedralo Bruno Ostropolki, fondmembro de la Argentina Esperantista Katoliko-Asocio, kaj la religia konsilanto de la asocio, Pastro Johano Ortego, S.J., unue predikis Esperantlingve kaj poste resumis hispanlingve.

Tiu sankta meso aŭ "Primicio" estis solene organizata de A.E.K.A. kaj inter la patronaro estis multaj verdstelaj eminentuloj. Ĉeestis D-ro J. A. Quina Gonzalez, prezidanto de A.E.K.A.; direktoro de mondfama katolika gazeto *El Pueblo*, kiu publikigis longan raporton kaj fotografajojn pri la okazintaĵoj; D-ro Henriko Munoz Del Campo, filo de konata Esperantista pioniro en Urugvajo kaj Argentino; Pastro Rudolfo Ragucci S.C. mondfama filologo, membro de la Reĝa Hispana Akademio, kiu ankaŭ estas Esperantisto.

Okaze de ĉi tiu feliĉa solenaĵo, Pastro Ostropolki jam ricevis gratuleterojn el multaj landoj.

ESPERANTO ĈE LA GAZETOJ

En la nuna tempo Esperanto ricevas fortan subtenon de diversaj nacilingvaj gazetoj kaj revuoj, inter kiuj ni salutas *Jiskra* (Fajreroj) en Třebič, Ĉeĥoslovakujo, kiu de Majo 1945 ĝis Januaro 1946 aperigis 780 liniojn de teksto pri nia movado kaj ankoraŭ petas artikolojn, kaj *Natura* monata revuo naturisma en Lisbo, Portugalujo, kiu dediĉas multan spacon al nia afero. Fakrevuo *Cykelbilisten* (Ciklomobilisto) en Säby, Svedujo starigis Esperanto-fakon kaj dediĉas duonpaĝon al Esperanto-teksto. La Internacia Bulteno de IAPK nun aperas kun paralelaj tekstoj en angla kaj Esperanta lingvoj.

Gvidfolio en Esperanto: Ĝojiga signo de la tempo estas la apero kun aldona Esperanta teksto de ilustrita gvidfolio pri Verona, Italujo. Eldonita de Asocio "Pro Verona" por la Fremdul-Trafiko: Verona, Corso Vittorio Emanuele N.1.

Rotario—Esperantistaj Rotarianoj ĉie estas petataj sendi al Rotariano C. C. Goldsmith (Sek. de IEL) la jenan informon: nomo, klubo, klasifiko, ofico.

RECENZOJ

* = akireblaj ĉe I.E.L.



***Gaja Leganto per Esperanto:** verkis kaj kompilis P. E. Schwerin. Broŝurita 56p., prezo 1ŝ. 3p., afranko 1p. Eld.

Esperanto Publishing Co. Ltd.

Lastatempe aperis pluraj verkoj kun la celoj interesi, distri, amuzi kaj instrui kursanojn. Ne ĉiufoje ili sukcesas en ĉiuj tiuj aferoj, kaj supozeble oni ne povas ricevi tute perfektan libron en la limoj de modera prezo kaj oportuna formato, kiuj estas gravaj konsideroj je tia entreprenajo.

Rekonante tiujn limigojn mi tamen salutas la aperon de ĉi tiu nova libreto kaj senrezerve ĝin rekomendas al kursestroj, studentoj kaj eĉ al progresintoj. Ni rajtas atendi, ke la lingvostilo de tiuspeca verko unue estu neriproĉebla kaj due, ke ĝi prezentu modelon kiun la studento povos kun profito imiti. *Gaja Leganto* kontentigas tiurilate. Se aldone al tio, la enhavo estas vere interesa, amuza kaj distra, la verkisto ja nin regalas! P. E. Schwerin meritas gratulon pro sia elektemo. Liaj spritaĵoj efektive estas spritaj kaj mi antaŭvidas multajn gajajn horojn ĉe la kursoj. Mi citu nur du, kiujn mi hazarde elektis:

Kontraŭ la Alkoholo

La instruistino volas demonstracii al la lernantoj la danĝeran efikon de alkoholo. Pro tio ŝi metis vermon en glason da alkoholo kun la rezulto, ke la vermo tuj mortis.

“Ĉu vi komprenas, kion tio signifas?” ŝi demandis la lernantojn.

La malgranda Karlo havis spritan ideon: “Tio pravas, ke vi neniam havos vermojn, se vi trinkas alkoholon!”

Azenoj

En la zoologia ĝardeno antaŭ la azenoj. Knabo: Paĉjo, ĉu ankaŭ la azenoj geedziĝas?

Patro: Nur azenoj . . . mia filo!

Krom la spritaĵoj troviĝas ankaŭ anekdotoj, matematikaj kaj aliaj problemoj, spritaj rimajoj, ludoj kaj bonaj konsiloj por kursgvidantoj. La preso estas klare legebla kaj la papero bona. Sufiĉe fortan paperan kovrilon ornamas bela kaj tre originala desegno, kaj la formato estas tre oportuna por la poŝo aŭ la mansaketo.

Ĉi tiun libron aĉetu, prunteprenu, eĉ ŝtelu . . . sed nepre ĝin havu!

Mason Stuttard

***Islamismo Esperantiste Rigardata:** orig. de Colin Evans: 32 p. broŝ. 14×10.8 cm., prezo 9p., afranko 1p.

Mi min demandas, kial ĝuste en la lasta tempo aperas en Esperanto tiom da novaj verkoj kun temo religia. Ĉu tio estas indiko pri la direkto de la homa pensado kaj spegulajo de la humoro de la tempo, aŭ ĉu nur signo pri malseverigo de la paperporciumo? (Bonvolu pardoni, se tio ŝajnas cinikajo—mi tion ne intencas). Estu kiel ajn, la jena libreto meritas nian saluton ĉar, kiom mi scias, ĝi estas pionira sur nova kampo.

La vorto *Islamismo* posedas por la neinformita okcidentulo kuriozan kvaliton, sugestian pri la pikaj aromoj de la bazaro, pri vualitaj virinoj, fanatike religia fervoro, moskeoj kaj la tuta mistera Oriento. Oni pensas pri la doktrino de fatalismo pri kiu, interalie, la aŭtoro atentigas pri multaj miskomprenoj. Des pli bonvena, do estas ĉi tiu verko ĉar nenion tian oni trovas ĉi tie. Anstataŭ tio, la aŭtoro kun evidenta sincereco objektive prezentas la bazajn principojn de sia kredo kaj montras, krome, kiom parencaj estas la kredoj de Islamismo kaj la Zamenhofaj ideoj pri Homaranismo. Multajn miskredojn pri sia religio S-ro Evans dispelas, kaj kondiĉe ke la leganto aliros la verkon kun komprenemo kaj kun tia grandanimeco kia, laŭdire, distingas la Islamanon, li ĉi tie trovos multon interesan kaj profitdanan. La ĉapitro pri edzeco kaj la rilatoj inter la seksoj faras multon por forigi erarajn kredojn pri tiu afero ĉe Islamanoj.

La lingvo plejparte estas modela. Enŝteligiĝis tamen kelkaj kritikindaĵoj, inter kiuj mi citu nur *multe* da anst. *multaj* pp. 6, 15 kaj *elektriko* anst. *elektro* p. 15. Mi rimarkis ankaŭ kelkajn preserarojn.

Mason Stuttard

***Pli Ol Fantazio** de A. Bøgh-Høgsted: el dana orig. trad. C. Graversen. Eld. Dansk Esperanto-Forlag. Broŝ. 70 p. 21.5×14.8 cm., prezo 3ŝ. 9p., afranko 3p.

La ĝenerala tono de ĉi tiu novelkolekto estas trankvila kaj milda, kaj se kelkfoje troa sentimentaleco kaj naiveco havas supersatigan efikon, aliflanke nin kompensas kelkaj vere fidindaj bildoj el la vivo. La aŭtorino ŝajne perceptas la vivon per tre akra vidpovo tiel, ke kelkaj priskriboj elstaras kiel vinjetoj kontraŭ alie nerimarkinda fono. La malforteco de la aŭtorino ŝajne kuŝas en tio, ke kvankam ŝi

perceptas la krudaĵojn de la vivo, ŝia troa sentemo ne permesas al ŝi prezenti ilin nudaj kaj sen ornamo. Oni tial ofte ricevas la impreson, ke ŝi volvas la okazaĵojn per vataĵo por ne ofendi la sentojn de la leganto. Ĉar la skolo de 'forkurismo' havas en la literaturo grandan sekvantaron, tre verŝajne ĉi tiu volumo trafos popularan akcepton ĉe la Esperanta publiko, kiel jam faris la originalo ĉe sia.

En la unua novelo *Sina Karlsson* ni kontaktas maljunulinon kiu pretervivis ĉiujn pasiojn de la vivo kaj kiu sin okupas preskaŭ sole per siaj memorajoj kaj sia kantiklo. La kurioza lojaleco, eĉ al malbona mastro, kiu ŝajne distingis la serviston de antaŭa generacio, pelas ŝin tra la neĝo al la tombo de la mastro por tie almeti la tradician Kristnaskan abibranceton. Ŝia morto tie apud la tombo estas traktata laŭ tradicie romaneca maniero, sed ne tre konvinkas. La morto, kaj precipe la morto de maljunulino malriĉega kaj mizera, ne povas esti bela.

Fraŭlino Angelica Løvenfelt kondukas nin al postmorta sceno ĉe la fina juĝo kun la (denove) tradicia retrorigardo super la perspektivon de la vivo, ekkonscio pri peko, juĝo, pentofaro kaj fina savo. Tre bone rakontita, tre sentimentala kaj tre, tre banala.

En *Ĉifono-Sørens* ni unuan fojon vere alproksimiĝas al la vivo. La knabo, kies nomo staras en la titolo, estas filo de malriĉegaj gepatroj. Temas pri aĉeto de nova bluzo por ke liaj vestoj ne tro hontigu lin dum la prezentado de komponaĵo lia en kiu li rolos kiel violonisto. Sed . . . oni devas nutri tiom da buŝetoj, kaj la patro spertas tiom da malfacileco ĉe ricevo de pago el klientoj . . . Jen la ingrediencoj de simpla sed kortuŝa rakonto.

Ne ofte la homo povas permesi al si la lukson de senrezerva sinfordono. En mondo ĉe troviĝas tiom da malpermesoj kaj tiom da malhelpoj, kiel bele estus, ekzemple, subite povi rompi fenestrojn laŭplaĉe!

En *Nokta Flutmuziko* la bona kaj deca lektoro ne rompas fenestrojn, sed por senŝargi sian animon de la subpremita emocio de jaroj li sin esprimas en tiu spirito per la sola rimedo por li ebla. Dum la tuta vivo lin regis kaj katenis per malpermesoj severa tiraneca onklino. Kiam naŭdekkvinjara ŝi subite mortas kaj li ekkonscias sian liberigon, li elprenas la dum kvardek kvin jaroj kaŝitan fluton kaj muzikas, muzikas. Ho kian regalon li donas al si! Kaj kia skandalo estas ĉe la najbaroj! Tiel muziki dum ankoraŭ kuŝas enĉerke la maljunulino!

La lasta el la kvin noveloj *La Desegnaĵo*

estas ĉarma amrakonto, iom memoriga pri la stilo de O. Henry.

La lingvo estas modela kaj facile legebla. Nur du-tri erarojn mi rimarkis ekz. sur p. 9 ĉe la logika tempo *deziris* anst. *deziras* kaj *kiom eble plej bone* p. 32 anst. *kiom eble* aŭ *kiel eble plej bone*. Tamen la principo de kontrolo de Literatura Komitato estas ĉiel laŭdinda kaj la rezulto pravigas la agon de la eldonistoj. En la fino de la volumo troviĝas listo de neologismoj ne en *Plena Vortaro*. Bone. Tamen, ĉu mi sugestu al eldonistoj, ke tiaj listoj pli oportune sin trovus, laŭ vidpunkto de leganto, en la komenco? Preso kaj papero bonaj. Tamen, ŝajnas al mi, ke la fantazia desegno sur la kovrilo tute ne harmonias kun la enhavo kaj povas miskomprenigi eventualan leganton.

Mason Stuttard

POPOLA KANTO

Inter la nuboj la luno spionas
dum de l'amantoj, dolĉe resonas
la babilad'.

Nur estas voĉoj, el koroj fluantaj;
nur estas vortoj, tute revantaj
al estontec'.

El la ĉielaj vojoj ĝi diras;
Ho ĝoju, ĝoju, kiŭ sopiras
en sia kor'.

Poste en nuboj la luno kaŝiĝas,
kaj al l'amantoj tute fariĝas
ombra silent'.

F. Pizzi, Italujo

RECIPROKE

Kiam la zefiro dolĉe vagas tra l' arbaro,
La voĉo kiu flustras inter la folioj estas via;
Kiel dum sunoraj tagoj, mia revo fantazia
Imagas vian ridon en la ridetanta maro.
Kaj kiam nokte ekpluvetas
Malpeze, avertante pro la ŝtormo,
Mi kredas aŭdi ĉiam
Vian robon, kiu trenetiĝas trans la dormo.

Kaj reciproke, kiam sola antaŭ vi mi staras,
Rideto via estas maro kie mi feliĉe dronas,
Kaj kvazaŭ dolĉe murmuranta vento, via
voĉo sonas,

Pasia pro la paradizo, kiun Amo faras.

Kaj ĉie, kien vi paŝetas

Pli arde flirtas ĉiu flora rondo,

Ĝis ne plu mi scias,

Ĉu la tuto estas vi, aŭ vi la tuta mondo.

Brendan Clark, Nov-Zelando

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	18.10	Bern (Svisujo). 47.28m. Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	20.00–20.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 49.92m. kaj ofte 1571m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Ra Moravska Ostrava.
Merkredo	16.00	Sofio (Bulgarujo). 352m. Parolado.
	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluj detaloj mankas.
	15.10–15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanto-programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je la 14a de junio.
	19.45–20.00	EAJ 14 (Hispanujo). Radio Castellón. 200m. Kurso de S-ro F. Rivelles.
	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	20.30–20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
Sabato	01.10–01.30	Sveda Radio. 31.46m. kaj 49.46m. Ripeto de la ĵaŭda programo por ekstereŭropaĵa Indoj. Nur je la 15a de junio.
	18.30–18.45(?)3	SR (Aŭstralio). 238m. Novajoj. Nur je la dua sabato ĉiu monato.
	19.00–19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.
	20.00–20.30	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Brita somera tempo oni aldonu unu horon, kaj por Mez-Eŭropa somera tempo du horojn, sed notu ke pro la enkonduko aŭ ne-enkonduko de somera tempo en diversaj landoj ni ne povas esti certaj pri la ĝusteco de ĉi tiu rimarko. Ni urĝe petas informon pri necesaj alligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevado.

LITERATURA VESPERO EN BUDAPEST

Post la milito okazis la unua Literatura Vespero en Budapeŝt organizita de HESL. Enirinte la ejon, mi vidis bele ornamitajn murojn. Sur ili diversaj flagoj kaj ornamaĵoj. Baldaŭ komenciĝis la programo kaj ĝis tiam mi iom ĉirkaŭrigardas inter la partoprenantoj. Jen mi vidas tie samideanojn K. Kalocsay, J. Baghy kaj L. Tárkony (Totsche), kiuj ŝajne pridiskutas iun gravan problemon de nia movado kun S-ro Stat-Sekretario D-ro Vasady Kovács. Mi iom alpaŝas kaj aŭdas, ke S-ano Baghy rakontas siajn travivaĵojn. "Ho, jes", li diras, "la belaj feliĉaj jaroj en diversaj landoj . . ."

Sed mi ne povas alparoli ĉar vekas mian atenton la alveno de S-ano M. Sárossy. Post saluto li tuj komencis paroli pri mia frato, kun kiu li pasigis kelke da agrablaj monatoj en Parizo. Kaj tiam mi diris, "Ho jes, la belaj feliĉaj jaroj kun mia frato ĉe *Literature Mondo* . . ." Feliĉe mi ne havis tempon rememori tiujn gaje-malgajajn jarojn. Novaj gastoj estis videblaj. Jen alvenis S-ano L. Kőkény, redaktoro de *Enciklopedio de Esperanto*; jen mi vidas S-anon Emba kaj amikon L. Halka. Sed mi ne plu povis mediti, ĉar komenciĝis la programo. Baghy rakonte amuzas la ĉeestantaron, Kalocsay kaj Tárkony deklamas siajn plej novajn poemojn, Sárossy kantas poemojn de Baghy. Kaj ilin aŭskultante mi imagas, kiom plezure aŭskultus la tutmonda Esperantistaro la voĉojn de tiuj eminentuloj. Sekvis parodio de radio, kaj ŝajnis al mi kvazaŭ tiuj mikrofonaj estus veraj transportiloj de sentoj kaj sonoj kaj mi aŭdas la voĉon: "Karaj samideanoj, parolas Radio Budapeŝt, sekvas programo de HESL. Aŭskultu, sekvas K. Kalocsay, kiu deklamas siajn poemojn . . ."

"La legomo estu bone kuirita . . ." subite mi revekiĝas, aŭdante la vortojn de la parodio prezentata. Ho ve, tamen Radio Budapeŝt ne ĉeestas, mi devis konstati. Sed tiam fulmrapide traboris mian cerbon: eble vi povus demandi niajn konatajn samideanojn pri la problemoj, kaj se ankoraŭ ne estas eble dissendi iliajn voĉojn per la radio, almenaŭ skribe estu disvastigata ilia parolo inter la Esperantistaron. Tuj mi decidis atendi la finon de la prezentado kaj fari intervjuon.

Senpacience mi atendis la finon de la programo kaj ĉirkaŭrigardis. Kiu estu la unua viktimo? Mi ekvidis Kalocsay, kiu ĵus ekstaris. Bonega okazo. Mi alkuris lin, tiras en apartan ĉamburon—br . . . estas iom malvarme—sed mi estis senindulga. Kaj miaj demandoj atakis lin. Certe mia unua demando nur povis esti:

"Kiel vi travivis la sieĝon de Budapeŝt?"

"Nu, mi ĝin ne travivis. Tiel konata estas mia abomeno al la faŝisma frenezumo, ke post la 'potenc-transpreno' de la sagkruculoj mi ne povis plu resti en la ĉefurbo. Mi tuj fuĝis al proksima vilaĝeto kaj tie min kaŝis. La vilaĝeto liberiĝis jam la 11an de Decembro kaj tie mi ankoraŭ du monatojn ekscitiĝis pri la krima 'defendo' de Budapeŝt. Estis terure konscii longajn semajnojn, kiel detruigis tagon post tago mia amata ĉefurbo. La sola konsolo estis, ke ni mem jam vivis en la mondo de la racio, ke ni jam savigis el tiu frenezulejo, kiu mia lando fariĝis sub la furiozo de la saguloj. Mi devas ĉi tie kortuŝe menciigi du junajn rusajn soldatojn—amindajn bubojn—kiuj entreprenis porti al mi sciigojn pri parencoj kaj konatoj Budapeŝtaj, kiam en la urbo ankoraŭ furiozis strataj bataloj. Mi ne scias, ĉu ili—Vasil kaj Viktor—ankoraŭ vivas; mi esperas, ke mi ricevos de ili Esperantan leteron—ili promesis lerni la lingvon hejme."

"Ĉu vi suferis multan difektajn?"

"Mia loĝejo restis sendifekta—nek bombo nek ŝtelo ĝin trafis. Bedaŭrinde mi estis tro zorgema: ĉiujn miajn valorojn mi kaŝis en 'bombsekura' kelo de iu mia amiko, kaj tie restas el ili nur la fulgo sur la muroj."

"Ĉu vi laboris ion lastatempe en Esperanto?"

"Mi hontas, ne tre . . . Longatempe min okupis medicina verkado kaj tio estis sufiĉe vana laboro, ĉar la libro ankoraŭ ne povis aperi kaj ĝis kiam ĝi povos, ĝi tiel antikviĝos, ke necesos ĝin reverki. Tamen ankaŭ mia Esperanta tirkesto ne estas malplena. Unue mi havas en ĝi plenan tradukon de la *Floroj de l' Malbono* de Baudelaire, faritan kune kun Waringhien kaj Tárkony-Totsche. Poste mi havas multajn poemtradukojn el la angla, franca, hungara, itala. Kaj jam ĉe la eksplodo de la milito aperis mia libreto de originalaj poemoj; mi kredas, ke ĉiuj ekzempleroj perdiĝis, sed mi gardas la presprovaĵojn. Krome mi havas preta la unuan volumon de la *Nova Krestomatia* (originala prozo kaj poezio); bedaŭrinde mi retrovis nur la poemojn, la prozaĵoj verŝajne perdiĝis en la kontoro de *Literatura Mondo*.

"Sed tio ja estas tute bela stoko. Kaj kredeble ĝi baldaŭ kreskos, ĉu ne?"

"Jes, kredeble. Sed momente mi estas tiel diversflanke okupata, ke mi apenaŭ povas imagi, kiel mi trovos la trankvilajn horojn por poezia aŭ alia verkado en Esperanto. Sed ankoraŭ malpli mi povas imagi, ke mi ne laboru en nia lingvo.

Estas certe, ke mi ne kabeigos. (Ĉi tio ne estas neologismo : temas pri Kabe).

"Ha ! Neologismo ! Kia estas via nuna sinteno en tiu ĉi delikata afero ?"

"Mi kredas, ke en la intermilita tempo la lingvo tiel riĉiĝis per novaj vortoj, ke ĉi-riilate sekvos paŭzo—Esperanto devos digesti tiun nutraĵon. Dum longa tempo ĝi ne bezonos novan, certe. Kaj tiu paŭzo kredeble trankviligos la ortodoksulojn tiom, ke ili pli pace toleros la uzon de la jam uzitaj neologismoj. Ili ja vidos, ke ne minacas senfina ŝveligo de la vortaro. Dume atendas alia grava tasko : fiksi esprimojn, idiotismojn, vortkunmetojn, do akceli la internan riĉiĝon de la lingvo. Tio estas por la literaturo same, aŭ eĉ pli, grava ol la ekstera vortriĉiĝo."

"Jen vi disvolvas tutan lingvistikan programon. Kiam vi eklaboros pri ĝi ?"

"Ho ve, tio estas demando de tempo. Estus bone se mi havus pli da tempo, kaj estus eĉ pli bone, se mi havus eĉ malpli da tempo (tio estas, se mi estus pli juna)."

"Ĉu vi volas eldevigi komplimentojn ? Vi aspektas pli juna ol antaŭe !"

"Eble nur pli malgrasa. Kaj anime mi certe refreŝiĝis en tiu ĉi libera mondo. Tiom da esperoj ĉie, malgraŭ la premaj cirkonstancoj ! Kaj inter tiom da esperoj, la lingvo de espero . . ."

"Nu, kiaj vi vidas ĝiajn ŝancojn ?"

"Mi kredas je la renaskiĝo de la mondo. Mi kredas, ke la sociala justo, la racia mondordo, anstataŭ la rego de blindaj ekonomiaj fortoj, la solidareco de la laboranta homaro forbalas la mond-konfuzon sen ke '*frat' fraton atakis ŝakale*'. Kaj tio kreas la veran atmosferon ankaŭ por la venko de nia lingvo. Ŝajne vi skeptike ridetas pri mia troa eĉuziasmo. Nu estas eble, ke ĉio ĉi ne okazos tiel tre rapide. Sed mi tamen estas kaj restas el la popolo de la esperanto . . ."

Pri tio mi tamen konsentis kun Kalocsay. Kaj laŭ bona hungara kutimo tion ni devis certigi per la trinko de glaso da vinc. Per tio mi ankaŭ cedis amikon Kalocsay al aliaj, sopire atendantaj la finon de nia interparolo. Kaj samtempe mi 'ĉasis' alian viktimon. Mi havis feliĉon. Baghy estis iom raŭka, kaj li ja same devis tion iom mildigi per trinko. Mi do tie renkontis, senhezite kaptis, kaj tuj faris al li la unuan demandon :

"Laŭ via opinio, kian efikon havis la dua mondmilito al nia lingvo kaj ĝia movado ?"

"Tre verŝajne ne la saman, kiel la unua mondmilito, dum kiu la humanismo kaj internaciaj kontraktoj estis pli malpli respektataj de la militintaj ŝtatoj kaj per tio ebligis, ke la diversnaciaj Esperantistoj

povis efektive praktike uzi nian lingvon en la internigejoj kaj militkaptitejoj. Fakte dum tiu periodo fariĝis nia lingvo vere parolata kaj vivanta lingvo kaj post la milito aperis multaj centoj da novaj energiaj adeptoj, kies laboro reliefigis tiel en la rapida evoluo de nia literaturo, kiel en la disvolvigado de la movado mem. Supozeble ni nun havos perdon de malnovaj batalantoj kaj mankon de tiuj, kiuj tiel praktike povis akiri la necesan lingvoscion. La ĵus finiĝinta universala detruado, nerespektanta humanismajn principojn kaj forpuŝanta eĉ la plej minumuman postulon de la internaciaj kontraktoj, alportos alispecan efikon : la idea parto de nia movado vekos pli da atento ol post la unua mondmilito."

"Ĉu vi aludas pri la 'interna ideo' Esperanto ?"

"Nur parte. Pli ĝuste esprimite, ĝi formas nur la kernon, ĉirkaŭ kiu produktiĝas la pulpo : la kulturhistoria misio de Esperanto. Konstateble, ke la mondo staras ĉe la sojlo de nova periodo, kies karakterizaj ecoj estas : nuligo de distancoj, malgraviĝo de la landlimoj, konstanta kresko de la trafiko vara kaj persona, evoluo de la kontinentaj interesoj (mi povas riski la esprimon, kontinentalismo, en kies kadro la diversaj nacioj estos devigataj serĉi kaj servi la komunajn interesojn de la kontinento mem), kaj fine lastavice, sed ne lastrange la defendo de la memstaraj naciaj kulturoj. Ĉio ĉi kune kvazaŭ altrudas tiun praktikan rimedon, kiu prezentas sin en Esperanto al la mondo kiel internacia helplingvo kaj kiel komuna kulturfonto per sia literaturo originala kaj traduka por helpi al la kristaliĝo de tiu tutmonda epokspirito, kiu regos la estontecon kaj stampos ĉion per sia speciala karaktero. La kulturhistoria misio de nia lingvo kaj movado ne plu estas fantaziado de kelkaj fanatikaj revteksantoj ; ĝi estas tutmonda bezono kaj per efektiviĝo de vera paco ĝi estos rekonata de ĉiu, sincere volas akceli la harmonian kunlaboron inter la nacioj kaj inter la kontinentoj."

"Ĉu vi estas konvinkita, ke Esperanto efektive estas la definitiva solvo de la lingvo internacia ?"

"Sendube ! Kiel lingvo, ĝi solvis la problemon, sed ĝi fariĝis certgrade 'socia problemo'. La lingvo laŭbezone evoluos ; nur ĝia lokiĝo en la socia vivo povas formi temon por diskuto : kiel, kiel kaj kiomgrade kaj kiam ĝi devas esti aplikata oficiale. Same estas sendube, ke sen Esperanto la efektiviĝo de la demokratiaj principoj ne estus kompleta, ĉar ĝia movado dum sia tuta ekzistado respugulis la demokratismon

idealan. Mi estas konvinkita, se dum tiu ĉi milito la vandalismo estus ekstermita ĉiun Esperantiston, eĉ tiam la movado rekomenciĝus pere de ĝia literaturo, kaj se oni estus forbruliginta ĉiujn Esperantaĵojn, eĉ el tiu cindro la nova generacio revivigus la lingvon, ĉar ĝi estas nepre necesa por la nevenkebla kaj konstante evoluanta vivo."

"Kion vi faris dum la milito, ĉu vi verkis, kio estas viaj planoj?"

"Mi suferis, kiel aliaj homoj nemistifik-eblaj per ideoj de la Mezepoko. Neniam mi estis riĉa, nun mi fariĝis pli malriĉa. Jen ĉio! Ankaŭ mi apartenis al tiuj poetoj, kiujn silentigis la armilbruo kaj ne inspiris la furiozanta malamo. Mi verkis romanon, daŭrigan de *Hura!* Bedaŭrinde la konpreta verko fariĝis viktimo de brulo. Ĉu mi reverkos ĝin? Mi ne scias. Inter miaj nunaj cirkonstancoj personaj estas nekredible. Tuj post la milito kaj mia resaniĝo mi verkis propagandan broŝureton kaj kompletan lernolibron por Hungario. Bedaŭrinde pro manko de papero tiu lasta estas 'sub preso' jam la okan monaton. Kion mi planas? Multon, sed . . . Plej volonte mi daŭrigos mian vivon tie, kie ĝi disŝiriĝis en 1938."

Vi vidas, ke S-ano Baghy fartas iom malbone. Li tamen venis tien ĉi por doni pli valoran efikon al la vespero. Tial mi ne plu demandis, sed ankaŭ ne konsentis kun li en la 'sed . . .', precipe ne kun la multaj punktoj. Jes ja, oni ne povas forgesi la suferojn de la militaj jaroj. Sed—malgraŭ la opinio de nia kara Baghy—mi scias, ke li povos daŭrigi sian vivon tie, kie ĝi disŝiriĝis en 1938. Mi certigis tion al li, kaj nu . . . por ke ĝi estu tiel, laŭ bona hungara kutimo, ni trinkis glason da vino.

Feliĉon nun mi tamen ne havis. Mi ne vidis pliajn viktimojn. Mi devis eniri la ĉambregon. En angulo mi vidis societon, inter ili mi ekvidis amikon Tárkony (Társchke). Haho, mi diris, venu nur kara, ke, respondu al miaj demandoj. Unue:

"Kiel vi travivis la militon?"

"Nu, jes mi sukcesis travivi . . . Kvankam mi forte dubis pri tia feliĉa fino, kiam mi kuŝis kun pleŭrito dek metrojn profunde sub la tero en la kelo de mia oficejo. Tamen, mi travivis, ĉar mi volis nepre ĉeesti la ekĝermon de l'nova mondo. Cetere mi perdis ĉiujn miajn havaĵojn: mian loĝejon, meblojn, vestojn, miajn librojn kaj skribmaŝinon. Sed mi perdis ankaŭ miajn malsanojn, ĉar en la lastaj jaroj konstante mi uzis medikamenton kaj unu jaro pasis jam de la liberiĝo de Budapeŝt kaj dum tiu jaro eĉ ne venis en la kapon, ke mi uzu kiun ajn kuracilon . . . Do ŝajnas al mi, ke la gajno superas la perdon,

eĉ ne parolante pri tio, ke nun mi vivas en mondo, en kiu espereble niaj idealoj survestos realajn konturojn. Kelkfoje mal-trankviligas min la penso, kion mi faros, se la sola vestaĵo, kiu restas ĉe mi eluziĝos, sed tiaj nigraj pensoj ne longe restadas, mi havas kapablon forgesi pri la mal-agrablaĵoj . . ."

"Post la sieĝo vi videble perdis ne nur viajn malsanojn, ankaŭ viajn malinklinon partopreni en 'movadaj aferoj'. Nun vi aktive partoprenas en la agado de HESL, dum en la lastaj jaroj vi tute ne inklinis partopreni en la movado. Kio kaŭzis tiun ŝanĝon?"

"Ĉu tio bezonas klarigon? La movado nun estas vere progresa, vere Esperantista afero. Dum la faŝismo la movado en nia lando havis ŝovinistajn, tute ne Esperantistajn tendencojn. Estas kompreneble, ke tia movado naŭzis min. Se foje-foje tamen mi aperis en ia kunveno, do mi volis renkonti miajn amikojn Esperantistajn, sed ĉiun oficialan rolon mi rifuzis."

"Ĉu vi havis Esperantajn travivaĵojn?"

"Jes, la plej belajn. Denove pruviĝis, kion oni jam delonge sciis, ke en okazo de neceso oni povas fidi pri siaj Esperantistaj amikoj. En la kelo dum mia vividanĝera malsano Esperantista kamarado Schuller-Sas kaj lia familio flegis kaj helpis min. Provizore mi trovis hejmon ĉe Esperantistaj kamaradoj Horváth kaj nun mi loĝas ĉe mia Esperantista amiko kaj kamarado, K. Kalocsay . . ."

"Ĉu vi laboris literature en la lastaj jaroj?"

"Jes, multe. Kiel mi estus povinta elteni alie la pezon de tiuj teruraj jaroj? Estas preta tuta volumo da miaj originalaj poemoj. Ankaŭ miaj verstradukoj ampleksus apartan volumon. Plej multe mi tradukis el la franca lingvo, pensante pri la *Franca Antologio*. Kiel por malnova amanto de la franca literaturo, tiu antologio estas por mi kor-afero."

"Tio memorigas al mi pri via 'francema' pseŭdonimo *Lali Blond*. Ĉu estontece vi uzos ĝin, aŭ vian malnovan nomon *Totsche* aŭ la novan *Tárkony*?"

"Ne plu estas motivo uzi pseŭdonimon, do kun dolora koro mi devas adiaŭi de mia kara amiko *Lali Blond*. Mia malnova nomo jam ne estas mia nomo, do mi uzos la novan. Sed dum iom da tempo mi almetos parenteze la malnovan."

"Ĉu nur tiun solan pseŭdonimon vi uzis en *Literatura Mondo*?"

"Tute ne. Mi memoras pri *John Atkins*, *L. Létinois*, *Louis Brun*. Kelkafoje mi

ENIGMA KONKURSO N-ro 5

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106, rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj el konkurso N-ro 3.
Silab-enigmo : Pli bona io ol nenio.

Slosilvortoj : Planedo, leopardo, ilekso, burleska, oksigeno, nostalgio, arlekeno, imperiestro, observi, oportuna, lekanteto, novembro, elipso, narkotiko, improvizi, omnibuso.

Magiaj kvadratoj :

rave - amat - vane - eter.
abon - bari - orel - nilo.
roman - odori - monak - arane - nikel.
eben - boru - erar - nura.
lapo - avel - peti - oliv.

Strangaj demandoj :

li havas bastonon - napoleono - cimbalo -
trompemulo - ananaso - ĝ (etaĝo) - ĵ
(nigraĵo) - p (etapo) - t (etato).

Enigmo N-ro 13. Krucvort-enigmo.

En ĉi tiu krucvortenigmo ĉiu plenigota kvadrato devas enhavi ne literon sed silabon.

	1	2		3		4		5	6	
7				8	9			10		11
12				13				14		15
				16				17	18	
19	20			21	22			23	24	
	25				26					
27				28	29			30		31
				32	33			34		
35	36			37	38	39				40
41		42		43				44		
	45					46				

Horizontale :

- tiu, kiu komisiita de organizo devas plenumi specialan funkcion.
- arto trafte kaj elokvente paroli.
- mara mambesto.
- personigo de la materiala riĉeco.
- rezono prezentanta alternativon inter du kontraŭaj asertoj.
- planedo.
- scienco pri la strukturo de la organismoj.
- malofita.
- preteriro.
- duope.
- tia muziko estas ĝenerale tre ŝatata.

- kaŝas en si grandegajn fortojn.
- dimensio de libro laŭ alteco kaj larĝeco.
- logika rezono, per kiu oni tiras aserton el alia aserto pere de tria aserto.
- laŭta prononcado kun artisme taŭga tono.
- naskis intereson.
- ordo de mambestoj, havanta en ĉiu makzelo incizivojn.
- aroma ŝelo de tropika arbo, uzata kiel spicaĵo.
- translokigi ion.
- trinkaĵo.
- konusforma korbo el salikaj veroj por kapti fiŝojn.
- supera lernejo.
- konjunkcio.
- reprodukti tekston per unu aŭ pluraj ekzempleroj.
- grajnon, el kiu oni faras ŝatatan frandaĵon.
- ekzilito.
- tuto de la procedoj per kiuj homoj kredas povi interrilati kun supernaturaj estuloj.
- insekto havanta kvar flugilojn koloritajn per diverskoloraj skvametoj.

Vertikale :

- sento de forta agito de la animo kontraŭ iu.
- entera loko, el kiu oni elfosas metalojn.
- tia literaturo estas ĝenerale distra.
- denove difini iun por iu posteno.
- montri subitan gajecon per karakteriza esprimo de la vizaĝo.
- furioza.
- grupo da elektraĵoj piloj.
- kondukisto de durada veturilo, kiu moviĝas per maŝino.
- iu kiu predikas al la homoj liajn devojn en socia aŭ privata konduto.
- ludkarto.
- kolektiva.
- erariga, ŝajne ĝusta rezono, farita sen trompa intenco.
- granda religia movado el kiu rezultis divido de la kristana eklezio.
- aparato por mezuri la pezon.
- Dio de amo.
- objekto farita por esti imitata.
- la Dipatrino.
- libro enhavanta kalendaron.
- orda numeralo de nombro el tri ciferoj.
- konstruo destinita por memorigi iun aŭ ion.
- poseda pronomo.
- trinkaĵo.
- forte redezirante al io perdita.

- 38. kiel 43 horizontale.
- 39. havanta nenormalan mallongan vidkapablon.
- 40. ĉirkaŭo de la homa korpo ĉe nivelo de koksoj.
- 42. persona pronomo.
- 44. eksciti al rapida kurado.

Enigmo N-ro 14.

EL TRI FARU UNU

El ĉiu trio da vortoj formu novan trisilaban vorton. Prenu por tio el ĉiu vorto unu silabon, sed faru tion tiel, ke la mezaj literoj de la novaj vortoj en la sama vicordo formas gravan admonon por ĉiuj esperantistoj.

En la vorttrioj :

Disĉiplo	- Galopo	- Refaldi
Tornistro	- Degeli	- Kantato
Soriko	- Skarabo	- Barakti
Manao	- Subbrako	- Novelo
Apenaŭ	- Karbunklo	- Kanoto
Tondilo	- Paroli	- Pendolo
Karesi	- Blazono	- Ekflori
Viando	- Karcero	- Tabano
Impliki	- Resoni	- Pulvoro
Aflikti	- Maldormi	- Kabalo
Kapoto	- Pasero	- Laktuko
Butono	- Diservo	- Vualo
Artiko	- Oktobro	- Ĝentila
Kredito	- Deklami	- Piloto
Kolego	- Fermento	- Dejori
Galanto	- Rafano	- Gorilo
Nikelo	- Kaliko	- Protekti
Kolimbo	- Funebra	- Sigelo
Senkulpa	- Ribeli	- Gratuli
Renversi	- Kantoro	- Toleri
Priplori	- Priplendi	- Moralo
Sorĉisto	- Gravuri	- Topazo
Boaco	- Kanapo	- Spirito

LA KANTO DE MIA KOR'

Laŭb' de Morto, laŭb' kvieta !
Kun luli! el sablo eta,
Tien iros mia filo.

Estas ja por filo ĝoje
Ĉe sinjoro Morto foje
Paŝti brutojn de Mortejo.

Tie por fil' ĝoje estas,
Li vespere dorme restas
Sur la brak' de Mortvirgino.

Por karulo ĝoje estas,
Li en orlulil' eknestas
Aŭskultante kaprimulgon.

Arbareto de Mortejo
Estas ĉiam paca ejo,
For el mondo la perfida.

El "Sep fratoj" de Aleksis Kivi
Tradukis Ilmari Ekström, Finnlando

SERVOPETOJ AL DELEGITOJ

Oni povas supozi, ke multaj samideanoj estas novaj inter ni kaj ne estas bone informitaj pri la kondiĉoj de la Delegita Servo de IEL, ĉar lastatempe ni ricevis plendojn pri misuzo de tiu servo.

La Regularo pri ĉi tiu servo aperas en la Jarlibro, sed ni opinias la aferon sufiĉe grava por ĉi tie fari apartan atentigon.

Oni sciu, ke la Delegito donas sian servon por la bono de la movado kaj ne por propra profito. Ni scias, laŭ propra sperto, ke tiu servo plej ofte estas tre malavare donata. Oni do ĝuste tasku la servon petotan.

Antaŭ ol fari servon, la Delegito devas esti certa, ke la petanto estas membro de IEL kaj tial oni unue devas atenti, ke Servokuponon de IEL akompanu la peton.

Ĉar la servo de la Delegito estas senpage donata, oni ne rajtas atendi, ke li elspezu la propran monon por fari servon. Do nepre kunsendu internacian respondkuponon, akireblan ĉe la poŝtofiĉejo, por respondo.

Kaj fine, se oni deziras ricevi respondon, estas prudente preslitere skribi la adreson, kaj nepre uzu Esperanton.

Neobeo al tiuj elementaj postuloj rajtigas la Delegiton ignori la peton.

I.E.L.

La Unua Esperantisto en Brazilo

Multaj geesperantistoj konas S-on Francisco Vladimiro Lorenz, kiel eminentan Esperantiston, brilan poeton, faman lingviston, estimatan homaronon. Aŭtoro de *Voĉoj*, *Esperanto sen mestro*, *Bukedetoj*, kaj de la fama traduko de la mondkonata ĉefverko de la hindua literaturo *Bhagavad-Gita*, li estas honore konata de la Esperantistaro, sed malmultaj scias, ke li estis la unua Esperantisto en Brazilo, kaj ke verŝajne li estas la plej malnova Esperantisto, kiu vivas.

En *Enciklopedio de Esperanto* ni legas, ke en la jaro 1890 li eldonis la *Plena Lernolibro de Esperanto* destinitan por la Ĉeĥoj. Do antaŭ 55 jaroj li jam konis nian karan lingvon sufiĉe bone por verki lernolibron.

Li naskiĝis en vilaĝeto Zbislav, Bohemujo la 24an de decembro 1872. Ĉiam li servis la altajn idealojn de la homaro kaj nun li ankoraŭ estas privata instruisto. Li verkis aŭ tradukis dekojn da libroj. Liaj tradukoj estis eltirataj el pli ol 400 lingvoj kaj ĉiam celis helpi la homaron.

P. Hubert, Parizo

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 182

OFICIALA INFORMILO

4an Majo 1946

NOVAJ PERANTOJ

Hindujo

S-ro H. B. Audich, 15 B-9 Sleater Road, Bombay 7.

Sud-Afriko

D-ro S. Liebeck, 35 Ave. St. Bartholomew, Fresnaye, Capetown.

NOVAJ DELEGITOJ

Acoroj

Ponta Delgada. FD (Pedagogio) : D-ro L. de Miranda, Rua da Mãe de Deus 58. Tel : 598.

Alĝerio

Batna. D : D. R. Touitou, 17 Rue Jules Terry. Tel : 1.46.

Angolo

Gabela. D : A. F. Pires, Capir, Novo Redondo, Angolo.

Argentino

Buenos Aires. FD (Arkitekturo) : F. H. Bereterebide, Segurola 3525. Tel : 50-4646.

FD (Fotografado) : E. A. Petit de Murat, Marcelo Gamboa 6720.

FD (Jurnalismo) : T. Sekelj, Gascón 75, 4-I.

Córdoba. FD (Horloĝoj) : F. Delprato, Colón 238. Tel : 98277.

Aŭstralio

Melbourne. FD (Fotografado) : F. Halls, 59 Pt. Nepean Road, Elsternwick, S.4. Tel : LF 8045.

Belgujo

Antwerpen. VD : W. de Schutter, Smedenstr. 3, Wilryck-Antwerpen.

Leuven. D : H. Boving, Kapusienen Voer 104.

Millen. D : L. Geukens, Langstraat, Millen-Tongeren.

Borneo

Sandakan. D : R. F. Vaughan, Sandakan, Brita Nord-Borneo.

Bulgarujo

Elhovo. D : J. Kirilov Obuŝtarov, horloĝisto.

Gorna Ĝumaja. D : B. Mihajlov, Lesničejstvo.

Pleven. D : M. Melamed, Br. Miladinovi 16.

Ruse. D : G. Bojkov, Bul. Car Osvoboditel 19. Tel : 27-24.

Sliven. D : I. I. Černaev, Rabotničejka 21.

Varna. D : S-ino V. Skolufanova, Ivan Vazov 9. Tel : 34-69.

Ĉeĥoslovakujo

Litomyšl. D : Karel Pěč, Litomyšl 226.

Mladá Boleslav. D : A. Rauwolf, Mladá Boleslav II/672.

FD (Junul-interŝango) : La D.

FD (Fervoja konstruado) : K. Fanta, Havlíčkova 591, Mladá Boleslav II.

Praha. FD (Ekonomio ; industrio) : D-ro M. Weirich, Ke Koulce 3, Praha XVI.

Strakonice. D : S-ino M. Pilarova, Havlíčkova 158, Strakonice I.

Uherské Hradiště. D : F-ino Ru Vilémová.

Veselí nad Mor. D : J. Pavlacky, Veselí nad Moravou.

Ĉinujo

Tientsin. D : King-Zeng Chang, P.O. Box 74.

VD : C. Y. Chow, P.O. Box 74.

Finnlando

Jyväskylä. D : Sulo Toiviainen, Vesanka, Finnlando.

Sideby (Siippy). D : Gustaf Wideskog, Ömossa, Kristinestad.

Francujo

Fontainebleu. D : R. Favre, 36 Rue de Fleury.

Mâcon. VD : B. Beau, 23 Rue de Lyon, Mâcon, (S. et L.)

Solliès-Pont. D : F-ino M. Martinez, Vilao "Niastel", Solliès-Pont (Var).

Vallauris. D : M. Betti, Rue Haute 3, Vallauris (A.M.).

Hispanujo

Zaragoza. D : E. Maynar, Manifestacion 35-2. Tel : 3067.

FD (Juro) : M. Maynar Barnolas, Juan y San Pedro, 4, pral. Tel : 31

FD (Kuracistaj aferoj) : F. de la Puente Solsona, Calle Gascón de Gotor 2. Tel : 4156.

FD (Orajstaj aferoj) : A. Ballestin Delval, Boggiero 142-2.

FD (Poŝto) : J. Orós Gimeno, Correos. Tel : 33-49.

Hungarujo

Budapest. D : P. Balkányi, Budapest 507, Kreditbank. Tel : 182-746, etendiĝo 212.

FD (Scienco) : D-ro F. Erdey, IV. Prohászka O. utca 7.

Sashalom. D : Prof. J. Mihalik, Révész utca 1, Sashalom, apud Budapest.

Italujo

Udine. D: G. Della Savia, via Asilo M. Volpe 47.

Varese. D: Corrado Cerri, Varese, Casale Litta.

Jugoslavujo

Tuzla. D: Hasan Odobašić, Tuzla, Džafer mahala.

Zagreb. D: Franjo Šlogar, Zagreb-Dubrava. Tel: 42-13.

VD: A. Jorgovanić, Mlinovi 1, Zagreb XII. Tel: 22341.

FD (Juro; internaciaj rilatoj): D-ro Ivo Lapenna, Ribnjak 14. Tel: 79-43.

FD (Komercio): La D.

Nederlandindio

Surabaja. D: Tjong Hie Liem, c/o Toko Johar, Doewet 60, Semarang, Java.

Nederlando

Gouda. D: A. Dykstra, Lange Dwarstraat 34.

Wageningen. VD: H.A.A. Van der Lek, Dijkstraat 11.

Palestino

Maabarot. FD (Komunumaj kolonioj): Grigor G. Choutoff. Tel: Nataniya 8-Y.

Safad. D: S-ino R. Blajman-Spizman.

Polujo

Tomaszów Lub. D: H. Białoszewski, Lwowska 50. Tel: 50.

Warszawa. FD (Elektrotekniko): S-ino F. Witulska, ul. Glogera 4, bl.II,m.20, Warszawa 22.

Portugalujo

Tramagal. VD: Marcalo Maximiano.

Svisujo

Belp. FD (Ĝardenkulturo): J. Guggisberg, Gartnerei Riedwyl.

Usono

Burn. (Wash.). D: A. C. Ballard, 215 Third St. N.E. Tel: 220 J.

Bakersfield. (Cal.). D: D-ro R. D. Loewenberg, 2724 La Cresta Drive, Tel: 6.6251.

Boston. (Mass.). D: G. W. Lee, 486 Boylston St., Boston 16.

Bowman. (N.D.). D: G. Hirsch, Route 5.

Chicago. (Ill.). FD (Nudismo; Leĝo). A. Knapp, 155 N. Clark St., Chicago 1. Tel: State 1439.

Cleveland. (Ohio). FD (Scienco; tekniko): L. Stern, 2995 Lincoln Boulevard, Cleveland 18.

Glendale. (Cal.). D: A. Kane, 1324 Raymond Ave., Glendale I. Tel: Citrus 2-8355.

FD (Aeronaŭtikaj aferoj): La D.

Kittery Point. (Maine). D: Woodbury Burd, U.S. Naval Base, Portsmouth, N.H. Tel: 318 r4 (hejmo).

Petrolia. (Penn.). D: F. W. Breth, Daugherty Refinery. Tel: Butler 29973.

Riverside. (Cal.). D: R. T. Arnold, P.O. Box 1014. Tel: 4700.

St. Petersburg. (Fla.). D: M. Amiel, P.O. Box 813.

San Francisco. (Cal.). FD (Bahaismo): F-ino L. J. Marshall, 20 Broderick St. Tel: UN 3674.

Woods Hole. (Mass.). D: D. Ericson, Woods Hole Oceanographic Institution. Tel: Falmouth 716 & 344.

ŜANĜOJ

Britujo

Lancing. D: vakas.

Lincoln. D: adresaĝo: 25 Grafton St., Monks Road.

London. FD (Radio): adresaĝo: 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth.

Rickmansworth. FD (Libro-komercio): adresaĝo: 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth.

Irlando

Dublin. FD (Ruĝa Kruco): vakas.

Kanado

Duncan. D: vakas pro translokiĝo.

Kongo

Niangara. D: vakas pro adresaĝo.

Polujo

Bydgoszcz. D: vakas pro translokiĝo.

Usono

Philadelphia. (Penn.). D: vakas pro translokiĝo.

St. Paul. (Minn.). D: vakas.

San Pedro. (Cal.). D: nova adreso: 2125 Grand Avenue.

MEMBRO-SUBTENANTOJ

223. S-ro A. S. Knapp, Chicago, Ill., Usono.

224. S-ro E. L. Clarke, Winter Park, Fla., Usono.

225. S-ro A. Martin, Mâcon, Francujo.

226. S-ro A. S. Holmes, Nottingham, Anglujo.

227. S-ino J. Verdier, Rotterdam, Nederlando.

228. F-ino H. M. Mulder, Badhoevdorp, Nederlando.

229. F-ino S. W. Bloemendal, Lochem, Nederlando.

DONACOJ por helpi al la forigo de la defcito: R. C. Marble 5s., T. J. Gueritte 6s., J. Sillence 3s.

DONACO al la Zamenhofa Kaso: F-ino A. S. H. Smith, 2s. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aprilo 1945 :

	1945	1946
Asociaj membroj ..	2702	4568
Individuaj membroj :		
MJ	603	764
MA	1307	3258
MS	103	224
Patronoj	21	23
DM	73	94
HM	8	20
	2115	4383
	4817	8951

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

NASKIĜO

Van Gindertaelen—Al Ges-roj Th. Van Gindertaelen, Leopoldstr. 95E, Mechelen, Belĝujo, je Pasko, filino Micheline—Mechelen, fratineto por Luc.

EDZIĜO

Callewaert-Norro—Je 24 Aprilo gædiziĝis Jacqueline Callewaert kaj Fons Norro, en Brugge, Belĝujo.

MORTO

Byatt—Mortis je la 18 Decembro 1945, Henry Byatt, 81-jara. Nia Vic-Delegito en Perth, Aŭstralio, li forte subtenis la movadon dum multaj jaroj.

D-RO A. COUTO FERNANDES

Kun granda ĉagreno ni sciigas al niaj legantoj pri la morto, post mallonga malsano, de D-ro A. Couto Fernandes en Rio de Janeiro, la 22an de Aprilo, 1946.

Dum 40 jaroj senlaca laboranto por Esperanto, li estis respondeca pri multaj gravaj sukcesoj en Brazilo. Kiel Prezidanto de Brazila Ligo Esperantista li alportis al ĉiutagaj problemoj la saĝon kaj prudenton de praktika homo, kaj samtempe per siaj alta idealismo kaj ekzemplo povis inspiri al nova fervoro kaj sindediĉo la samideanojn kun kiuj li rilatiĝis. Dum apudtomba parolado I. Gomes Braga trafe diris: Via scio de la lingvo estis granda, sed multe pli granda estis via amo al la nobla ideo de homa interkompreno kaj kunfratiĝo, al kiu kondukas la interna ideo de Esperantismo. Vi ne nur amis kaj vivis tiun sanktan ideon, ĉar vi forte vivigis ĝin en la koroj de aliaj homoj per pacienca laborado tra jardekoj, tra tuta vivo de supera homo . . .

Ni deziras esprimi nian plej profundan kunsenton kun la vidvino de nia altsatata samideano kaj kunfunebros lian forpason.

Literatura Vespere (fino).

mem hezitas, ĉu iun recenzon mi verkis aŭ iu alia."

"Espereble vi kuraciĝis ankaŭ el via pseŭdonimemo?"

"Jes, tute."

"Ĉu prozajn manuskriptojn vi ne havas?"

"Por la *Moderna Hungara Antologio* mi faris kelkajn noveltradukojn, sed dum la sieĝo ili perdiĝis. Eble ĉe mia amiko Hilda Dresen en Tallin troviĝas la kopioj de kelkaj el ili, sed mi ankoraŭ ne povis kontaktiĝi kun ŝi. Al la neniam forgesbla Helmi mi transdonis ilin dum nia lasta renkonto en Budapeŝt ĝuste antaŭ la eksplodo de la milito kontraŭ Polujo."

"Ĉu novaj planoj?"

"Miajn travivaĵojn mi volus priskribi en formo de rakonto, sed por tio mi bezonas liberajn horojn, kiujn mi tute ne havas."

"Nu mi esperas, ke vi havos tiajn horojn."

"Sed nun mi demandas vin!"

"Nu?"

"Kiam vi eldonos miajn poemojn?"

Mi iom embarasiĝis. Verdire mi jam tion demandis en tiu ĉi vespero, sed mi tamen ne konjektis, ke oni ankaŭ min demandos. Sed la embaraso daŭris nur minuton. Mi ekmemoris, kiel multaj leteroj informaj kaj gratulaj flugas al mi. Ili ĉiuj demandas pri la bonfarto de la redaktararo de *Literatura Mondo* kaj esprimas sian deziron pri la plej proksima daŭrigo de nia antaŭmilita laboro. Kaj tion memorante, mi firme kaj senhezite en unu vorto respondis:

"Postnelonge!"

B. Bleier, Hungarujo

ESTU BONHUMORA

Unu policano tre deziris kontroli, ĉu oni faras ĉion laŭleĝe. Iufoje marŝante laŭlonge de riverbordo li renkontis fiŝiston ĉasatan fiŝojn per kano.

"Ĉu vi ne scias, ke necesas havi permeson pri fiŝkaptado," li demandis la fiŝiston.

"Ho! Sinjoro Policano, mi ne fiŝkaptas; mi nur instruas al la insekto pri naĝado!"

"Des pli malbone," respondis la policano. "Vi pagos monpunon ĉar via insekto ne portas bankostumon!"

* * *

Unu vesperon oni invitis faman ŝerculon el la proksima urbedo je fiksita horo. Kuniĝinta societo multe malpacienis pri lia malfruigo. Fine li alvenis spiregante.

"Sciu, mi superruzis la fervoj-kompanion."

Oni tre sciavide lin rigardis.

"Ha, ha, mi pagis la bileton, sed ĉi tien venis piede!"

Z. Jedrzejewski, Polujo

Letervespero—Esperantista klubo de Malá Strana, Praha III, Ujezd 5, c/o restoracio Dašek, festeno fine de junio letervesperon kaj deziras riĉan alsendon de bildkartoj k.t.p. Respondo garantiata.

Ilustritajn poŝtkartojn el ĉiuj landoj deziras interŝanĝi, garantiata respondo. F-ino Paquita Garcia Nuñez, Lista de Correos, MADRID, Hispanujo.

Deziras korespondi kun anglaj ge-Esperantistoj S-ino Käthe Lampe, Familien-gärten, Hochstr. 51, Berlin-Heinersdorf, Germanujo.

Antikvaĵoj el Egiptaj tomboj, faraonaj, greko-romanaj, Moslimanaj. Moneroj, manuskriptoj, pentraĵoj. Lunzer, P.O.B. 196, Alexandria, Egiptujo.

Esperanto-grupo en arbkultur-vilaĝo Boskoop deziras ricevi leterojn, poŝtkartojn, markojn, kaj aliajn Esperantaĵojn el ĉiuj mondpartoj, ankaŭ por propagandceloj. Respondo garantiata. Adresu al: W. Weerheijm, Berkenweg 39, Boskoop, Nederlando. Ĉiam validas.

Tutmondaj firmoj komercaj dezirantaj importi pipojn faritajn el erika radikoj kaj artiklojn por fumantoj skribu al O. Lemichez, Don (Nord), Francujo.

Lab. Esp. Grupo, Enschede, Nederlando (van Coeverdenstr. 39) festos en aŭgusto tridekjaran ekziston. Sendu bildkartojn aŭ leterojn. Nepre respondos.

Komercistoj kaj firmoj dezirantaj havi komercajn rilatojn kun Egiptujo (eksporto kaj importo de diversaj varoj) estas petataj tuj kontakti la IEL Ĉefdelegiton en Egiptujo: D-ro Tadros Megalli, P.B. 450, Cairo, Egiptujo.

S-ro Luciano Thevenin, 2 rue du 11 novembre, St. Etienne, Francujo deziras korespondi kun Islamaninoj.

Helpu al nia propagando !! Esperanto-grupo en Leicester okazigos grandan propagand-kunvenon en Aŭgusto. Bonvole sendu poŝtkarte dezirojn pri sukceso el ĉiuj landoj. Raporton pri la kunveno ricevos ĉiuj sendinto. S-ro G. Collis, 288 Clifford Road, Leicester, Anglujo.

Grupo "Verda Stelo" en Varsovio petas sendi por sia biblioteko trailegitajn gazetojn, ne bezonatajn librojn, ktp., kaj serĉas por siaj membroj korespondantojn en la tuta mondo. Sin turnu al S-ro R. Sakowicz, Asnyka 4, Warszawa-Okecie, Polujo.

Hortikultura vortaro Esperanta estas serĉata de ĝardenistoj en Ĉeĥoslovakujo. Skribu al L. Kynčl, ĝardenisto, Palmovka, Královská, Praha VIII, Ĉeĥoslovakujo.

Geedzoj en Ĉeĥoslovakujo deziras korespondi pri ĉiuj temoj, precipe pri muziko, sporto, kaj interŝanĝi poŝtkartojn kaj gazetojn. Jaroslav Dušek, Jeseninova 243, Usti-Strekov II.

Deziras korespondi amike kun ĉiuj landoj 24-jara samideanino. S-ino C. Rossetti, 5 Mayville Avenue, Wrexham, Anglujo.

BONOKAZO !

La anoncanto deziras rilatiĝi kun serioza studento Esperantista, kiu volas antaŭenigi sian edukadon per ĉeestado ĉe Usona kolegio.

En bataleto infanteria dum la plejlasta bedaŭrindaĵo, la subskribinto perkugle kapvundiĝis tiel, ke parte paralizigis la korpo. Nuntempe, post elhospitaliĝo, li bezonas viron por sin helpi pri la ĉiutagaj necesaj kaj pri radseĝa irado al lernejo. Provizitaj al taŭgulo estos mango, dormejo, malgranda salajro kaj veturigo al Usono.

Por pliaj detaloj interesatoj, **kiuj disponas la subajn kvalifikojn**, sin turnu per programane (ne maŝine) skribita letero al: S-RO R. C. MARBLE, 301 BLOOMFIELD RD., BURLINGAME, CALIFORNIA, USONO.

Por esti konsiderata kiel taŭga, oni devas :

- (1) Scipovi flue Esperanton kaj skribe kaj parole.
- (2) Scipovi la anglan lingvon sufiĉe por ricevi, post praktiko, instruon per ĝi ĉe lernejo.
- (3) Esti ne pli ol 30-jaraĝa kaj ne malpli ol 18-jaraĝa.
- (4) Esti fortika kaj sufiĉe fort-muskola.
- (5) Esti ne malpli ol 1.75 metrojn alta senŝue, kaj ne malpli ol 63 kilogramojn peza senveste.
- (6) Esti senedzina.
- (7) Esti bonsana kaj plejparte bonhumora.
- (8) Esti Diplomito de altlernejo kaj laŭleĝe preta ĉeesti kolegion.

Esperantistoj ! Bonvolu ĉi-anoncon cirkuli tiel, kiel eblas al vi.

NOVAJ LIBROJ KAJ LIBROJ DENOVE HAVEBLAJ

Anstataŭna Edzino.	E. Maxwell (M. Sampson) ..	Bind.	6 ŝil.
Du Majstro-Noveloj.	T. Storm (H. Heitmüller) ..	Bind.	5 ŝil.
Jarmiloj Pasas.	H. Haefker	Bind.	16 ŝil.
Universala historio verkita originale en Esperanto.			
Landoj de l' Fantazio.	Teo Jung	Bind.	8 ŝil.
Pli ol Fantazio.	A. Bøgh-Høgsted (C. Graversen)	Broŝ.	3ŝ. 9p.
Synnøve Solbakken.	B. Bjørnson (Weide) ..	Broŝ.	2 ŝil.
Interesa Norvega Rakonto.			
Vagabondo kaj Sinjorino.	W. Klopffer (L. Goppel)	Bind.	6 ŝil.

Aldonu 10% por la afranko.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA INTERNACIA ASOCIO DE POSTMARK-KOLEKTANTOJ

Nia asocio NE estas societo per kiu sin amuzi. Ni povas liveri ĉiujn servojn, kiujn donas aliaj societoj, sed nia celo estas **LABORI POR ESPERANTO** inter filatelistoj.

Kredante, ke la flankokupano utiligos Esperanton kondiĉe nur, ke ni montru al li kiel utila ĝi povos esti, ni celas bonan filatelan organizaĵon.

SED . . . ni bezonas la kunhelpon de samideanoj, ĉu filatelaj, ĉu ne. Precipe ni bezonas agentojn Esperantistajn en multaj landoj—plej grave ekster Eŭropo.

Petu ekzempleron de nia Internacia Bulteno, por kiu bonvolu sendi neuzitan kurantan poŝtmarkon de via lando por kovri la sendkoston.

Organiza Sekretario :

P. H. LEWIS, XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo